EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 63. Novembro 6, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alkroĉaĵoj: 684 KB. Sume: 1110 KB.**

## AMO 104 okazis en Fortaleza, Brazilo

La Tut-Amerika Kongreso de Esperanto venis al fino. Ĝi gastigis la seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO) kun ĉeftemo ''Tut-amerika kunlaboro'. Kiam la partoprenintoj estos revenintaj hejmen, EKO atendas ricevi raporton. Intertempe ni alkroĉas la enkondukan prezentaĵon de SMG por la seminario.

## AMO 105 okazos tuj en Kroatio

**8-a Memorialo Lucija Borčić / 105-a AMO-Seminario:**
**Temo: "Esperanto en (publikaj) bibliotekoj".**

Tempoj: CET, kiel en Zagrebo – tio estas UTC+1. Eŭropo jam transiris al la vintraj horoj. La seminario okazos per Zoom.

***11-a de novembro**, sabato*

- 14.00-14.30 Stefan MacGill: Malfermo
- 14.30-15.00 Marija Belošević: Lucija Borčić - vivo kaj verko
- 15.00-15.45 Rubeno Fernandez: Katalogado de esperantaĵoj en publikaj bibliotekoj kun historia alrigardo al CDELI
- 16.00-16.45 Rubeno Fernandez: Katalogado de esperantaĵoj en publikaj arĥivoj kun katalunaj ekzemploj
- 16.45-17.30 Mireille Grosjean: Fulmrigardo al kolektejoj de esperantaĵoj
- 17.30-18.15 Diskuto

***12-a de novembro, dimanĉo***

- 14.00-14.45 Janez Jug: Esperanto en la biblioteka sistemo COBISS
- 14.45-15.30 Ostoj Kristan: Biblioteko de SIEL
- 15.45-16.30 Marija Belošević: Biblioteko de la Katolika universitato de Lublin - KUL kaj IKUE
- 16.30-17.15 Krešimir kaj Marija Belošević: Esperanto en Nacia kaj universitata biblioteko de Zagrebo
- 17.15-18.00 Diskuto

***13-a de novembro**, lundo*

- 14.00-14.45 Roland Rotsaert: Esperanto en esperantaj kaj ne-esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj en flandra (nederlandlingva) parto de Belgio
- 14.45-15.30 Doi Hirokaz: Esperanto-Muzeo en Jokohama
- 15.45-17.15 Zsófia Kóródy: Esperanto-sekcio en la publika urba biblioteko en Herzberg am Harz kaj Biblioteko de Esperanto-Centro Herzberg
- 17.15-18.00 Diskuto

***14-a de novembro, mardo***

- 14.00-14.45 Pascal Dubourg Glatigny: Transiro de asociaj al publikaj bibliotekoj
- 14.45-15.30 Gabriela Skonieczna: Nuna situacio ĉe Nacia Biblioteko en Varsovio
- 16.00-16.45 Bernhard Tuider: Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko
- 17.30-18.00 Proklamo de la rezultoj de la 7-a Tradukkonkurso "Lucija Borčić" kaj la Foto-konkurso "Kroatio de via okulo"
- 18.00-18.30 Fermo

## Aliĝu senpage al la 4-a Virtuala Kongreso!

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ni rememorigas, ke de la 23-a ĝis la 26-a de novembro 2023 okazos la **4-a Virtuala Kongreso de Esperanto** (VK): https://vk.esperanto.net. Ĝi jam fariĝis la plej grava kaj granda reta evento de Esperanto en la mondo! En 2023 la tuta scienca programo de Torino, entute 22 prelegoj, estos spekteblaj kadre de la VK, samkiel tiu de Montrealo estis en la pasintjara VK. Cetere, reklamocele al la 4-a VK jam la prelegoj de la 3-a VK en UEA-viva: https://www.youtube.com/ueaviva. Estas tre facile aliĝi al la 4-a VK! Kiel individua membro de UEA **vi rajtas senpage aliĝi** (sed nur ĝis la 13-a de novembro 2023). Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru per https://vk.esperanto.net – sufiĉas informi vian plenan UEA-kodon (kvin literoj) - Post la limdato de nov. 13 povos aplikiĝi simbola kotizo. Por proponi programeron: eblas tion fari kaj por la kerna programo kaj por la Virtuala Movada Foiro. Tion eblas fari ĝis inkluzive la 5-a de novembro. Vidu, kiel tion ĉi fari, ĉe: https://vk.esperanto.net/2023/programo.

Ni kore invitas vin subteni la eventon per donaco: tion eblas fari dum la aliĝo. Tiuj, kiuj donacos €50 aŭ pli aperos kiel Subtenantoj. Ankaŭ eblas konstante donaci per: https://uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso.

Laŭ komuniko de UEA

## Ĉinio kaj Zaozhuang festas jarfine

Artikolo pri la du-monata celebrado por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo de la Zaozhuang-Universitato, de la komenco de oktobro ĝis la komenco de decembro.

https://esperanto.cri.cn/2023/10/30/ARTI95nhBBVjYgDoKgFoZXMe231030.shtml

Alessandra Madella

## Ĉina subteno por la UK en Aruŝa

Hodiaŭ samideanoj de la granda ĉina urbo Xi'an kunvenas por esprimi siajn apogojn kaj subtenojn al la UK okazonta en Tanzanio en la jaro 2024. Tiu Universala Kongreso estos grava ĉar ĝi estos la unua en la Afrika Kontinento. Afriko pli kaj pli fariĝas la nova pionira regiono por Esperanto-movado en la 21-a jarcento, la fekunda sojlo kie la semo de la lingvo de Ludoviko Zamenhof povos abunde ĝermi kaj

produkti multajn bonajn kaj lertajn esperantistojn. La Esperanto-movado en Afriko estas tre aktiva kaj ĝi meritas gastigi tian gravan eventon, speciale post la problemoj kaŭzitaj de la tutmonda pandemio. Homoj ne kongruas kun distanca kontakto, ZOOM-renkontiĝo ne sufiĉas! Oni nepre devas fizike kunveni en difinita loko, kie ni esperantistoj povas vidi unu la alian, ne nur kiel "bildoj sur ekrano".

## Retaj kunsidoj pri Esperanto en Lernejoj

Partoprenis naŭ homoj, el kiuj multaj ne partoprenis antaŭe, interalie 4 el Serbio.

Komence Aranka Laslo raportis pri sia lasta agado en Serbia mezlernejo kun kiu ŝi havas kontrakton por volontula agado. Ŝi prezentis Esperanton (Unu leciono pri Esperanto) en 6 klasoj entute al 150 lernejanoj kaj al la klasestroj. Je la fino 9 lernejanoj (6%) montris intereson kaj lasis sian nomon. El merkatika vidpunkto 6% estas bona rezulto. Aranka invitis ilin partopreni en reta kurso de Serbia Esperanto-Ligo (SEL). Sekvis diskuto kiel kuraĝigi lernejanojn plustudilerni post la unua leciono pri Esperanto, interalie kiel montri praktikan utilecon de Esperanto. Jen kelkaj ideoj:

- Al lernejanoj kiuj ne povas/pretas partopreni regulajn kursojn, proponi mem lerni per Duolingo (el la angla) aŭ per plurlingva kurso ekz. <lernu!> aŭ Kurso de Esperanto Kape (http://kurso.com.br/elshuto.php), ankaŭ disponebla kiel apo por Android-telefonoj ĉe Google play. Tiukaze indas proponi duan rendevuon dum la jaro al la lernantoj.
- Proponi retan kunvenon inter klasoj de diversaj landoj por ebligi interŝanĝon kiel tio jam okazis. Ahmad plu proponas al instruistoj uzi la zoom-salonon de Irana Esperanto-Asocio. Por tio necesas organizanto kiu alvokas aliajn instruistojn aŭ lernejajn agantojn.
- Organizi vojaĝon de Eo-klaso al alia Esperanto-klaso en alia lando. Tio pli malfacilas sed eblas eĉ kun stipendioj de Erasmus+. Emmanuel Debrières el Francio jam organizis tion.
- Organizi konkurson por ke lernejanoj prezentu ion en Esperanto je la fino de la lerneja jaro. Povus esti por diversaj aĝo-grupoj el kiuj multaj estas komencantoj. Ahmad alvokas al proponoj kaj volontuloj por organizi ion kadre de ILEI.

Dato por la 5-a kunveno pri Esperanto en lernejoj: dimanĉo la 3-a de decembro 2023, ekde 10:00 UTC esperante ke instruistoj el la tuta Azio povos partopreni.

Didier Janot

## Itala premio por la itala Instituto de Esperanto

Itala Instituto de Esperanto partoprenis en Premio por "European label of languages". Ni prezentis la unuan jaron de la projekto 30 oraj horoj kaj nekredeble la itala registaro premiis nin (nia projekto estis inter premiitoj de aliaj lingvoj, do Esperanto estis konsiderata vere kiel lingvo).
Do la 24-an de oktobro okazis en Romo (Italio) ceremonio por la premiado dum kiu oni havis la okazon paroli pri nia projekto dum konferenco pri Erasmus+ projektoj. Estis granda scivolemo pri nia lingvo kaj ankaŭ la komisiono montris intereson por la uzo de Esperanto kiel propedeŭtika lingvo kaj kiel lingvo por interkulturo.

Laura Brazzabeni +39 3286461063 (ankaŭ vacapo) direktoro de IEI, http: istituto.esperanto.it

## Mirejo mesaĝas el Katmanduo

Hieraŭ kunvenis grupo de dek junaj nepalanoj, kiuj fondis Eo-grupon. Temas pri du studentoj en supera mezlernejo, du studentoj en universitato, kaj 6 universitataj

diplomitoj, kiuj laboras en loka NeRegistara Organizo (NRO). Ili lernas Eon per la helpo de instruistino el Meksiko, Gilda, kadre de la Londona Eo-Klubo. Ili jam havis kvar lecionojn, do estas tutkomencantoj. Tamen ilia motivado estas fortega, ili estas viglaj kaj lertaj. Mi povis prezenti al ili la movadon kaj trakti iliajn demandojn.
Ilia celo kaj slogano, frapfrazo, estas "Speak peace, act peace". Mi dirus: "Parolu pacon, agu pacen". Ili volas fari ion konkretan PER Esperanto. Ni pripensas. Bv esprimi sugestojn, se vi volas. Adreso de la plej aktiva inter ili: Rita Thapa.
thaparita.988@gmail.com

Mireille Grosjean, el Nepalo.

## Stel-brila aŭkcio el Aŭstrio

La 16-an de novembro 2023 okazos aŭkcio de Esperanto-Steloj-moneroj en la renoma aŭkciejo DOROTHEUM en Vieno. Vi povas aĉeti serion 1 + 5 + 10 + 50 + 100 Steloj. Aldoniĝas broŝuro pri la Stelo.

| Nominalo | Materialo | Maso | Diametro | Eldonjaro | Eldonkvanto |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 Stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959 | 5000 |
| 5 Steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959 | 5000 |
| 10 Steloj | Cu – Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959 | 5000 |
| 50 Steloj | Ag 0,925 | 30,0 g | 40 mm | 2020 | 300 |
| 100 Steloj | Ag 0,999 | 31,1 g = 1 unco | 37 mm | 2018 | 1000 |

Cu = kupro; Ni = nikelo; Ag = arĝento.

Jen la ligiloj: www.dorotheum.com/de/l/8759834/ 1176; www.dorotheum.com/de/l/8759837/ 1177

La aŭkcio komenciĝos je la 10-a horo. Pliaj informoj: esperanto@chello.at

Walter Klag, ILEI

## Libro-ekspozicio en Dakaro

Senegalaj esperantistoj estas invititaj partopreni en la Unua Internacia Junulara kaj Infana Libro-ekspozicio (Salon International du Livre de Jeunesse et pour Enfants de Dakar) kiu okazos en Dakaro de la 15-a ĝis la 18-a de novembro 2023 (rete trovebla). Cele al reprezentiĝo de Esperantujo senegalanoj petas ĉiun ajn kiu povos, sendi librojn de iu ajn fako (libroj pri matematiko, fiziko, kemio, botaniko, sociologio, biologio, ktp) por ekspozicii ilin kaj tiel sciigi al ĉiuj homoj, ke Esperanto ekzistas, ke ĝi estas vivanta lingvo aplikebla en ĉiuj kampoj de la vivo. Laŭeble sendo de brokantaj komputiloj estus bonvena, estus ekonomika avantaĝo. La plej rapida sendo, verŝajne, estas per EMS (Express Mail Service).

Lafi Charles DIATTA, Sekciestro de Senegala ILEI-Sekcio (laficharlesd@gmail.com) :

======= vortoj: 1453 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.